

bulteno

de Esperantista Klubo en Praha

Věstník Klubu esperantistů v Praze

N-ro 1/2008 (182)

Únor/februaro 2008

Z obsahu – el la enhavo:

La Internacia Jaro de Lingvoj	2
Saluto de Kurisu Kei	5
Jiří Karen: Se eble mi ne revenus	6
Jiří Karen Sub libera ĉielo	8
Zdenka Bergrová: Párnice	9
Zdenka Bergrová: Solstico	12
Karel Havlíček Borovský: Epigramoj	13
Jaroslav Seifert: Jarní den	14
Čestmír Vidman: Nikso	15
Čestmír Vidman: Ĉielo – infero – paradiz'	15
Josef Fousek: Kredo	16
Miroslav Malovec: Ĉu ni havas strategion?	17
Kamila Bártlová-Lampířová / Jaroslav Krolupper: Úvaha filosofická	21

Klub aktivního stáří Kulturní dům Vltavská uspořádá v pondělí 25. února 2008 ve Velkém sále od 14.30 h divadelní představení **Skandál kolem Josefa**, které zahraje divadelní umělkyně Stanislava Hošková. Jde o známý biblický příběh Josefa a Putifarky, který v esperantu napsal Valdemar Vinař, autor několika esperantem psaných děl. Představení v kulturním domě Vltavská bude provedeno v českém znění.

Regulaj kunvenoj de Esperantista Klubo en Praha okazas ĉiuĵaŭde de la 14-a ĝis 16-a horo en la kunvenejo Ve Smečkách n-ro 25, Praha 1, proksime de la Venceslaa placo.

La jarkunveno de la klubo okazos la 20-an de marto 2008 de la 15-a ĝis 17-a horo.

Pravidelné schůze Klubu esperantistů v Praze se konají každý čtvrtek od 14. do 16. hodin v místnosti Ve Smečkách č. 25, Praha 1, blízko Václavského nám.

Výroční členská schůze se bude konat 20. března 2008 od 15. do 17. h.

La jaro 2008 – la Internacia Jaro de Lingvoj

En la mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko s-ro Koïchiro Matsuura pri la celebrado de la Internacia Jaro de Lingvoj en 2008, estas dirite:

La jaro 2008 estas proklamita Internacia Jaro de Lingvoj fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. Unesko, al kiu oni konfidis la taskon kunordigi la agadon por la Jaro, pretas plenumi sian rolon kiel gvida aganto.

La Organizaĵo estas plene konscia pri la decida graveco de la lingvoj por la multaj defioj, kiujn la homaro devos alfronti dum la venontaj jardekoj.

La lingvoj fakte estas nepraj por la identeco de la homaj grupoj kaj individuoj kaj por ilia paca kunekzisto. Ili estas strategia faktor opor antaŭeniri al daŭropova evoluto kaj harmonia rilato inter la tutmonda kaj la loka sferoj.

La lingvoj havas kernan gravecon por atingi la ses celojn de Edukado por Ĉiuj kaj la Jarmilajn Evoluigajn Celojn (JEC) aprobitajn de Unuiĝintaj Nacioj en 2000.

Kiel faktoro de socia integriĝo, la lingvoj ludas strategian rolon en la forigo de la ekstrema malriĉeco kaj malsato (JEC 1), dum kiel kolonoj de alfabetiĝo kaj lernado de kapabloj por la vivo ili estas ankaŭ nepraj por atingi universalan unuanivelan edukadon (JEC 2). La batalo kontraŭ HIV/aidoso, malario kaj aliaj malsanoj (JEC 6) devas utiligi la lingvojn de la koncernaj homgrupoj por trafi ilin, kaj la konservado de lokaj kaj indiĝenaj scioj kaj lertoj strebe al naturmedia plutenblo (JEC 7) estas kerne ligita al lokaj kaj indiĝenaj lingvoj.

Plie, la kultura diverseco estas intime ligita al la lingva diverseco, kiel indikce en la Universala Deklaracio pri Kultura Diverseco de Unesko kaj ĝia Agoplano (2001), la Konvencio por la Konservado de la Nemateria Kultura Heredaĵo kaj la Konvencio pri la Protektado kaj Antaŭenigo de la Diverseco de la Kulturaj Esprimiĝoj (2005).

Rok 2008 – Mezinárodní rok jazyků

V poselství generálního ředitele UNESCO pana Koïčira Matsuury o oslavách Mezinárodního roku jazyků v roce 2008 je řečeno:

Rok 2008 byl prohlášen Mezinárodním rokem jazyků Valným shromážděním OSN. Organizace UNESCO, které byla svěřena koordinace oslav, je připravena ujmout se svého řídicího úkolu.

Organizace si plně uvědomuje rozhodující význam jazyků v řadě výzev, kterým lidstvo bude muset čelit v následujících desetiletích.

Jazyky jsou vskutku nezbytné pro identitu lidských skupin i jednotlivců a pro jejich mírové soužití. Jsou strategickým faktorem, který umožňuje trvalý vývoj a harmonický vztah mezi úrovní celosvětovou a lokální.

Jazyky mají základní význam k dosažení šesti cílů Výchovy pro všechny a Rozvojových cílů tisíciletí (RCT) přijatých OSN v roce 2000.

Jako faktor společenské integrace hrají jazyky strategickou roli při odstraňování největší bídy a hladu (RCT 1), jako sloupy alfabetyzace a učení se schopnostem potřebným pro život jsou také nutné k dosažení základního vzdělání (RCT 2). Boj proti HIV/AIDS, malárii a dalším nemocem (RCT 6) musí používat jazyky dotyčných skupin, aby se pokyny neminuly účinkem, a uchování lokálních a domorodých vědomostí a zručností v jejich přirozeném prostředí (RCT 7) je také vázáno na lokální a domorodé jazyky.

Navíc, kulturní různost je důvěrně svázána s jazykovou růzností, jak je uvedeno ve Všeobecné deklaraci o Kulturní různosti UNESCO a v plánu práce (2001), v Konvenci pro uchovávání duševního kulturního dědictví a v Konvenci o ochraně a rozvoji různosti kulturních výrazů (2005).

Tamen en la daŭro de kelkaj generacioj pli ol 50% el la 7000 lingvoj parolataj en la mondo povos malaperi. Nun estas uzata malpli ol kvarono el ili en la lernejoj kaj interreto, kaj la plimulton oni uzas nur sporade. Miloj da lingvoj – malgraŭ tio, ke ĉiu estas regata de homgrupo kiu ĝin uzas kiel ĉiutagan komunikilon – forestas el la edukistemoj, komunikaj rimedoj, eldona industrio kaj ĝenerale el la publika sfero.

Urĝas agi. Kiel? Per la kuraĝigo kaj prilaboro de lingvopolitiko ebliganta al ĉiu lingvokomunumo la uzon de ties gepatra lingvo kiel eble plej vaste kaj ofte, ankaŭ en la edukado, apud la rego de iu nacia aŭ regiona lingvo kaj iu internacia lingvo. Ankaŭ kuraĝigante la parolantojn de regantaj lingvoj regi alian nacian aŭ regionan lingvon kaj unu aŭ du internaciajn lingvojn. Nur se plurlingvismo estos plene akceptita, ĉiuj lingvoj povos trovi sian lokon en nia tutmondiĝinta mondo.

Tial Unesko invitas la registarojn, UN-organojn, organizaĵojn de la civila socio, edukajn instituciojn, asociojn de profesiuloj kaj ĉiujn aliajn koncernatojn stimuli la respekton, antaŭenigon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj, precipe de tiuj endanĝerigitaj, en ĉiuj situacioj de la individua kaj kolektiva vivo.

Ĉu per iniciatoj sur la eduka kampo, la interreto aŭ la klera medio; ĉu per projektoj por savtenado de endanĝerigitaj lingvoj aŭ antaŭenigo de la lingvoj kiel iloj de socia integriĝo; aŭ per esplorado de la interrilato inter la lingvoj kaj la ekonomio, inter la lingvoj kaj socioj de la indiĝenoj aŭ inter la lingvoj kaj la kreado, estas necese ke la ideo „lingvoj gravas!“ estu diskonigata ĉie.

Tiukuntekste, la 21-a de februaro kiel dato de la naŭa Internacia Tago de la Gepatra Lingvo havos elstaran signifon kaj estos aparte taŭga limdato por la enkonduko de iniciatoj celantaj antaŭenigon de lingvoj.

Nia komuna celo estas atingi agnoskon sur la nacia, regiona kaj internacia niveluj, pri la graveco de la lingva diverseco kaj plurlingvismo en la eduka, administra kaj jura sistemoj, en la kulturaj esprimoj kaj komunikaj iloj, en la interreto kaj komerco.

La Internacia Jaro de Lingvoj 2008 alportos unikan kancon por fari decidan antaŭeniron survoje al la atingo de tiuj celoj.

Přesto v průběhu několika generací více než 50% ze 7 000 jazyků světa může zaniknout. Nyní je ve školách a na internetu používána méně než čtvrtina z nich, a většina jen okrajově. Tisíce jazyků – navzdory tomu, že každý z nich je ovládán lidskou skupinou, která jím každodenně mluví – chybějí ve školském systému, v komunikačních médiích, ve vydavatelském průmyslu a všeobecně ve veřejné sféře.

Je nejvyšší čas jednat. Jak? Povzbuzením a zpracováním jazykové politiky, která umožní každé jazykové komunitě používat svůj mateřský jazyk co možná nejčastěji a v nejširším rozsahu, také ve výchově souběžně s ovládnutím některého národního, regionálního nebo mezinárodního jazyka. Také povzbudit mluvčí vládnoucích jazyků, aby se naučili další národní nebo regionální a jeden nebo dva jazyky mezinárodní. Pouze, když bude mnohojazyčnost plně akceptována, budou moci všechny jazyky najít své místo v globalizujícím se světě.

Proto UNESCO vyzývá vlády, orgány OSN, civilní společenské organizace, výchovné instituce, profesionální svazy a další zainteresované, aby podnítily úctu, rozvoj a ochranu všech jazyků, zvláště těch ohrožených, ve všech situacích individuálního a kolektivního života.

A to buď iniciativami na výchovném poli, v internetu a v prostředí vzdělanců; nebo projekty pro záchranu ohrožených jazyků nebo podporou jazyků jako nástrojů společenské integrace, nebo zkoumáním vztahu mezi jazyky a ekonomikou, mezi jazyky a znalostmi domorodců nebo mezi jazyky a tvůrčí činností. Vždy je třeba přitom dbát, aby se všude šířilo heslo „jazyky jsou důležité!“

V souvislosti s tím bude 21. únor – jako datum devátého Mezinárodního dne mateřského jazyka – mít mimořádný význam a bude to vhodný termín pro uvedení iniciativ směřujících k rozvoji jazyků. Naším společným cílem je dosáhnout uznání na národní, regionální a mezinárodní úrovni o důležitosti jazykové různosti a vícejazyčnosti ve výchovném, administrativním a právním systému, v kulturních vyjádřeních a sdělovacích prostředcích, v internetu a obchodu.

Mezinárodní rok jazyků 2008 přinese unikátní šanci učinit rozhodný krok vpřed k dosažení těchto cílů.

(český překlad M. Malovec)

Rok 2008 byl Valným shromážděním OSN prohlášen Mezinárodním rokem jazyků.

Tato skutečnost je obzvláště významná pro esperantisty, protože právě před sto lety – v roce 1908 byl založen Světový svaz esperantistů – Universala Esperanto-Asocio (UEA). Z tohoto důvodu můžeme rok 2008 považovat nejen za Mezinárodní rok jazyků, nýbrž také zcela oprávněně za Mezinárodní rok esperanta.

Při této příležitosti skupina polských představitelů v Evropské unii podala návrh, aby letošní Nobelova cena za mír byla udělena organizaci Universala Esperanto-Asocio v Rotterdamu, za trvalé úsilí a celkový přínos esperantistů celosvětovému dorozumění mezi národy.

Bez ohledu na tuto skutečnosti podal esperantský PEN-klub návrh Švédské královské akademii věd, aby Nobelova cena za literaturu byla udělena významné esperantské spisovatelce paní Marjorii Boultonové z Velké Británie. Paní Boultonová je autorkou řady děl nejen v esperantu, ale i v angličtině.

U příležitosti stého výročí UEA se bude letošní 93. světový kongres esperanta konat ve dnech 19. až 26. července 2008 v Rotterdamu, přičemž hlavním tématem jednání kongresu bude „100 let UEA a jazyky – poklad lidstva“.

Příští už 94. světový kongres esperanta se bude konat v roce 2009 v polském Białymstoku, rodišti tvůrce esperanta Ludvíka Lazara Zamenhafa, u příležitosti 150. Výročí jeho narození. Vedení města a především starosta města Białymstoku již podnikají kroky k důstojné oslavě svého rodáka a jeho díla, mezinárodního jazyka esperanta.

La jaro 2008 estis de Ĝenerala Asembleo de UNO proklamita La Internacia Jaro de Lingvoj.


Tiu ĉi fakto estas aparte multsignifa por esperantistoj, ĉar ĝuste antaŭ cent jaroj – en la jaro 1908, estis fondita Universala Esperanto-Asocio (UEA). Pro tiu ĉi kialo ni povas la jaron 2008 konsideri ne nur kiel la Internacia Jaro de Lingvoj, sed ankaŭ tute laŭrajte kiel la Internaci Jaro de Esperanto.

Ĉeokaze grupo de polaj reprezentantoj en la Eŭropa Unio faris proponon, ke la ĉi-jara Nobel-pacpremio estu atribuita al la organizaĵo Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo, pro la daŭra penado kaj entuta kontribuo de esperantisto jala tutmonda interkompreniĝo inter nacioj.

Sen konsidero al tio la Esperanta PEN-klubo proponis al la Sveda reĝa akademio de sciencoj, ke la Nobel-premio por literaturo estu atribuita al la elstara Esperanta verkistino sinjorino Marjorie Boulton el Britio. Sinjorino Boulton estas aŭtoro de vico da verkoj ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la angla.

Okaze de la centa datreveno de UEA la nunjara 93-a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 19-a ĝis 26-a de julio 2008 en Roterdamo, kun la ĉefa temo de la kongreso „100 jaroj de UEA kaj la lingvoj – la trezoro de la homaro“.

La venonta jam 94-a UK de Esperanto okazos en la jaro 2009 en la pola Białystoko, la naskiĝurbo de la kreinto de Esperanto Ludoviko Lazo Zamenhof, okaze de la 150-a jubileo de lia naskiĝo. La urbestro kaj precipe la urbestro de Białystoko jam entreprenas agojn por digna glorigo de sia samurbano kaj de lia verko, la Internacia Lingvo Esperanto.



Saluto de KURISKU Kei en la inaŭguro de la Universala Kongreso en Jokohamo

Bonvenon al Japanio, karaj gesamideanoj, gekamaradoj kaj geamikoj el la tuta mondo!

Mi, KURISU Kei el Japanio, nun havas grandan honoron kaj pleuron saluti vin kiel la dojeno de UEA, ĉar jam 97-jara mi ankoraŭ vigle agadas verkante kaj prelegate ne nur japane, sed ankaŭ esperante. Mi ŝatus ĉi-okaze eldiri kelkajn vortojn pri tio, kion mi nun rigardas aktuala en la tutmonda Esperanto-movado, anstataŭ fari rutinan saluton.

Jen estas la esperanta traduko de „Resurekto“, la mondfama romano de Lev Tolstoj. En kom da ekzempleroj ĝi eldoniĝis, vi pensas? Ne miru, ke nur en Vincent. Vi, esperantistoj ĝenerale, certe ne estas nelegemaj; multaj e lvi kredeble tralegis tiun romanon siatempe, sed en la traduko de sia nacia lingvo. Ĉi tio estas la fenomeno ne nur ĉe „Resurekto“, sed ankaŭ la komuna fenomeno ĉe la esperantaj verkoj literaturaj ĝenerale. Bedaŭrinde la esperantistoj ĝenerale ne tre aĉetas esperantajn verkojn. Jen kial niaj esperantaj eldonejoj hezitas eldoni ilin, sekve kial multaj el la ĉefverkoj de la mondliteraturo, kiel ekzemple „David Copperfield“ el Anglio, „Moby Dick“ el Usono, „La Mizeruloj“ kaj „Jean Cristophe“ el Francio, „Milito kaj paco“ kaj „Fratoj Karamazov“ el Rusio kaj „Rakonto de Genzi“, plej malnova romano en la tuta mondo el Japanio, ankoraŭ ne estas esperantigitaj kaj eldonitaj.

Kian utilon alportos al vi aĉetado kaj legado de esperantaj verkoj? Da ili estas sufiĉe multaj. Antaŭ ĉio via supovo de esperanto saltem plialtiĝos. Rezulte la nombro de la individuaj membroj de UEA, la centro de la tutmonda Esperanto-movado, rimarkinde pligrandiĝos, kio konsekvence kontribuos al pligrandiĝo de la prestiĝo de esperanto en la okuloj de la monda publiko.

Do senprokraste aĉetu esperantajn librojn. Mi kiel la iniciativo de ĉi tiu ideo la unua el vi aĉetos jam hodiaŭ en la Libro-servo de la Kongresejo ne unu, sed plurajn, eble sufiĉe multajn esperantajn librojn. Por tio mi kunportis dorsosakon, jen ĉi tiel.

Mi finas. Dankon, karaj gesamideanoj, gekamaradoj kaj geamikoj el la tuta mondo!

Jiří Karen

Se eble mi ne revenus...

(Fragmentoj el leteroj kaj taglibroj el Germanio, el la tempo de la dua mondmilito.)

Magdeburg, la 18-an de decembro 1942

Kara Věra,

„panjo“, kiel bele tio sonas; tion scias nut riu, kiu ne povas tiel iun alparoli. Mia panjo vivis kun mi ĝis mia sesa jaro. Tiam mi venis al la onklino Helena, ŝia fratino. Panjo servis ĉe bienuloj. Tiutempe kaj ankaŭ nun ĝi estas neniŭ mielvivo. Vi skribas, ke via panjo ŝatus sendi al mi panon. Dume mi havas sufiĉe da pano. La onklino sendas al mi, ankaŭ la knaboj el lernejo. Sed estas ĉi tie multaj homoj, kiuj havas nenion. Venas al ni en la ĉambron ukrainoj, pokaze mi kontaktas ankaŭ rusajn militkaptitojn; tio sendube estas danĝera, sed eblas nenion fari. Al oni estas hontinde manĝi kaj rigardi, kiel la alia malsatas. Sed vi donos al du kaj la tria foriras kun nenio. Sekve, se vi povus por tiu celo ion sendi, vi estus afabla. Sufiĉas por ni io ajn, sed via panjo ankaŭ devas kalkuli. Mi ne scias, ĝis kiu grado vi scias la administradon de via domo. Tial vi iel interkonsentiĝu, por ke mi ne kaŭzu malfacilaĵojn. Vi volas, ke mi skribu al vi ion, kiel ni vivas ĉi tie. Kiel mi pripensas, kio ĝojigus vin, trudas sin al mia plumo versoj.

Plaŭdoj de ludkartoj, krio kaj disputo.

Rikane arbo kun folioj kverelas.

Tabloj surverŝitaj per ŝlimo.

Per malpuraĵoj surŝprucitaj vandoj kaj planko.

Moke la luno tra fendo internen rigardas.

Ĝi ekvidis min: per ŝiraĵoj de tristo mi estas vestita.

Ne lavita, ne razita. Lampoj sen ŝirmiloj.

Pedikoj, miaj amikoj, blatoj, niaj fratoj.

Per ŝvito fetoras animoj kaj korpoj.

Rido ruliĝas tra la ĉambro kiel monero rustiĝinta.

En ligno ronĝas anobio. En ŝranko umas tineo.

El angulo kun riproĉo min rigardas lernolibroj.

Ĉu arto kaj science? Ĉi tie ili estas ridindaj.

Malviva lumo de lampo (avarule ĝi kalkulas ombrojn).

Ekstere muĝas vento. Fumon ĝi resendas en fumtubon.

Al ni ankoraŭ ŝajne vivaj

frosto kaj morto proklamis mobilizon.

Plaŭdoj de ludkartoj, krio, disputo.

Ĉi tie arbo kun folioj (kaj trabo kun pordokadro) kverelas.

En la ĉambo ni estas dudek. Kaj ĉiu ulo alia figuro. Malsama eduko. Altlernejano, mezlernejano, primitivko. El urbo, el grandurbo, el periferio, el vilaĝo. Teologoj kaj ankaŭ homoj de la praga kanalizacio. Ankaŭ buĉisto, masonisto. Ili ne estas homoj bontonaj. En la vivo ili ne kutimis labori kun mortero aŭ hakilo delikate. Eble tion instruis al ili la vivo. Tial vi ne povas kolera kontraŭ ili. Ili volus labori laŭ sia metio; dume oni alligis ilin al maŝinoj. Ĝi estas meĥanika laboro, tio enuigas ilin. Ili venĝas sin mem, ili venĝas kontraŭ la vivo, unu kontraŭ la alia. Ili estas malkontentaj, sed sian malkontenton ili ne analizas, ne serĉas la kaŭzojn. Sed aliel ili estas bonaj uloj. Se temus pri io grava, eble pri la vivo, ili superus dek intelektulojn...

Sed mi ne vivas ĉi tie nur malgaje; ne estas ĉi tie aferoj nur tenebraj. Memkompreneble mi devas la pozitiven aferojn organizi. Tiel ekzemple ĉe laboro. Stari dek du horojn ĉe maŝino kaj fari senĉese la samon, tio estas nenio ĝojiga. Tial mi dum laboro kantas. Vi scias, ke mi kanti ne kapablas, sed tio ne gravas. En la halo estas terura bruego. Neniu aŭdas vin. Vi povas eĉ sakri. Iam-tiam mi ŝercas pri mia germano, kiu instruas min ĉe la nova frezmaŝino. Aparte agrabla estas la ŝercado pri kontrolisto. Mi venas al li kaj diras:

- Mi petas vin, mi ŝatus ion vendi al vi. Kaj malmultekoste.

Li mienas, ke ne, sed jam li ĝojas, ke li ion ricevos.

- Do, kion vi volas vendi al mi?

- Mi vendos al vi du kilogramojn da bona humoro...

Mi ne rajtas pro la monotoneco perdi la humoron. Multe mi pensas. Mia tuta pasinta vivo etendiĝas antaŭ mi, sed ĉefe la estonta. La nuntempo kvazaŭ ne ekzistus. Mi pensas pri tio, kio en mia vivo estis bona, kion daŭrigi, kio bona ne estis, kion ĉesigi. Ĉiam mi antaŭmetas iun temon por pripenso. Konstante mi havas ĉemane paperon kaj kraĵonon. Mi havas multe da laboro. Sed kiam mi enfiksas stangeton, estiĝas kvarohoreto da trankvilo. Mi devas esti atentema por ne transpaŝi la punkton, post kiu okazus malagrablaĵo. Mi skribas notojn, kiam mi havas iajn ideojn. Foje tio estas verso, foje penso. Unufoje mi paŭzas, dufoje mi ion notas. Ĉe la kamaradoj mi valoras iom kiel frenezulo. La laborestroj komence persekutis min, ke dum laboro mi ne rajtas ion skribi, sed mi parolkonvinkis ilin kaj ili dume lasis min trankvila. Ili nur fruntofrapas sin...

Antaŭ semajno ni ŝanĝis loĝejon. Ni estas en nova ĉambro. Forveturis hejmen: Brhel, Malina, Nový. Tri malbonaj spiritoj de nia ĉambro. Malicaj, arogantaj kartamantoj, kiuj lumigis ĝis maeno, sekve ni ne satdormis. Neniu kapablis konvinki ilin amike. Ili estas for. Vi ne kapablas imagi, kiel ĉio ĉi tie ŝanĝiĝis. La homoj estas esence bonaj, ili estas nur malliberigitaj de egoismo. Estas necese la bonecon el ili elfosi. Sed ĉefe vi devas scii: atenton, nun estas alia situacio, nun ni devas konformi. Ĉiu estis ĉi tie por si mem, unu kontraŭ alia. Kiam venis pakaĵo, neniŭ donis al alia eĉ peceton. Tial ili enviis al si reciproke, ili kvetlis. Paŝon post paŝo ni tri, Rozinka, Kuchař kaj mi, sukcesis konkeri tiun ĉi terenon. Dum hegemonio de tiuj tri viroj ni devis silenti. Neniu partianiĝus al ni. Ne inciti vespojn estis devizo de ĉiuj. Esti silentaj kaj neokulfrapaj...

Du, kiuj fuĝis kaj estis kaptitaj, revenis en la ĉambron. Kiel pun dum semajno ili ne ricevas manĝaĵon. Kiu donos al ili panon? Neniu emas al tio. Ili malsatas. Malsato estas malbona amiko. Ili priŝtelus nin nokte. Ni devus gardi ilin. Bonŝance venis paketoj, unu de via panjo. Tial informu ŝin, ke ĝi tre bone utilis al ni. Ni manĝigis ilin, sed estis kondiĉo, ke ili faros ĉiujn laborojn necesajn en la ĉambro. Pro manĝo ili estis komplezaj por ĉio. Por la ĉambro ni jam laboras ses. Kiam lakros dek, tio estos jam duono de la ĉambro. Iu bezonas cent kronojn, kompreneble en markoj. – Jen ili. – Vi perdos ilin, minacas kamaradoj. Li estas fihomo, li ne redonas, nur prunteprenas. Al multaj li ion ŝuldas. La bubo malaperis, li forveturis hejmen. Post monato venis pakaĵo kaj ankaŭ cent kronoj. Nu vidu, ne estas tiel malbone...

Estadis ĉi tie krédo. Nun, kiam mi skribas, oni iras ĉi tie piedpinte. Por karbo mi ne plu iradas. – Nur skribu, vi portis ĝin ĝissate. – Venas avizo, ke en la stacidomo estas pakaĵo. – Donu ĝin al mi, mi tien veturos, mi alportos ĝin. Ne perdu la tempon, skribu, poste vi tralegos tion al mi. Seidel forprenis ie en manĝejo nigran tabulon, en laboruji li forŝtelis kreton. Ni havas ĉi tie tabelon de servoj, ĝi estas sinoptika. Tomek al ni tri riparis ŝuojn, li estas lerta. Sufiĉis laŭdo. Nenion li volis por tio. Rodr estas bona knabo, sed li estas terure furioza; li agas senpripense. Ni iradas kun en laboron. Li havas malagrablaĵojn kun amikino. Li bezonus skribi al ŝi, ASCII ŝiajn intencojn. Tial li petis min. Li pruntis al mi leteron, mi skribis por li respondon. Ion ŝi eksciis pri li, ŝi prenis tion kiel pretekston por povi rompi kun li. Li estas malfeliĉa pro tio. Estas vane ion ajn klarigi al ŝi, - Knabo, tio ne havas valoron, ŝi volas disiĝi, tio estis nur preteksto.

Disiĝu kun ŝi, ŝi nur turmentos vin. Li trankviliĝis, jam eblas tute prudente paroli kun li...

Mi estas iom ilia konfidenculo. Ili proponas al mi legi iliajn leterojn, ili konsiliĝas kion fari, ĝis min surprizas ilia korido. Mi ne rajtas seniluziigi ilin. Ni strebas en la ĉambro fariĝi amikoj. Ni havas la semajnon de ridetoj. Ni promesis al ni, ke kiam ni venos hejmen, la tutan semajnon neniu el ni nubmienos, sed estos afabla kaj ĝentila. Al ĉiu, eĉ al grumbulo. Ni interkonsentis. Ĉe interparoloj ni ne parolos pri ni. Ni demandos la aliajn, ni lasos ilin satparoli. Tiel ni ekscios multon pri ilia pasinteco. Ankaŭ pri malsukcesoj, malfacilaĵoj. Pli bone oni konsilos al iu, kiam oni scias tion ĉi. Pli bone oni povas paroli kun iu, kiam oni scias, ke li havas parte nervan malsanon. Tiam lian labilecon oni ne konsideros difekto de karaktero. Tio postulas iom da takto, jen kaj estas pli bone. Kiel bubo mi sopiris esti bandito. Miaj infanaj revoj plenumiĝas. Mi surprizatakas maltrankvilajn animou. Ni atakos ilin per propono aŭ vorto, kiam ii tion plej malmulte bezonas. Sed mi ne kapablas esti tia ĉiam. Mia eraro..

(Esperantigis Jiří Patera)

Jiří Karen

Sub la libera ĉielo

V.

T E R O

Altmontaroj

1

Gigantaj lumraketoj sur la horizonto
ses kaj duonan miliardon da jaroj aĝaj
Super la lando majeste malfermitaj
kiel tabelo de la dekalogo

Al arĝentaj cignoj similaj
ili forflosas de ni en nebulojn
supren ĝis la bluo Ĝis tien
kie la interparolo de la montaranoj avaras
je vortoj

Kaj malfacile ĉi tie oni iras
al avanco

2

Kiel nukso krevas la muskolaro de la rokoj
per makzeloj de internaj tertremoj ŝiregataj
kiam nesatigeblaj fosmaŝinoj kaj dinamito
la kirasojn de la rokoj krakmordas

Kiam ili kunpuŝiĝas kun kaŝitaj flugiloj
(Vane! Per sento profite mon vine satigos).
ĉu vi aŭdas de sube kriegon de kristaloj
pistitaj de doloro?

Jen ploras

estonta diamanto

La roko kriegas en doloro

Ĝiaj idoj – etaj ruĝstonoj

konsente kraketas

Al tiuj kiuj alfiksas al si flugilojn

(Kaŭkazo)

Nin ravis

krutaj montopintoj
kaj pureco de la ĉielo

ĉar en tiu agleca alto

super la sovaĝeco de la kampoj
kaj la volvoj de la ravino
kie la haŭto de la rokoj
estas ŝirvundita de pluvoj

ni faradis promenojn

laŭ kablo senfinen
al la senlimo de nuboj

ni rigardis

kiel sovaĝa fumo
el abelujoj de abelisto
kolrompe grimpas
super krutaĵon

(Daŭrigota)

(Esperantigis Jaroslav Mráz)

Zdenka Bergrová

P á r n í c a

En la Filozofia fakultato de Karola Universitato printempe de 1945 ekpulis la vivo. La somera semestro estis mallonga, sed sufiĉis, por ke mi enlistigu min por tridek du studfakoj, senorde kaj ĥaose. Ĉe iu aliĝo mi renkontis la aminikon Věra el la jam malfondita skolta trupo. Post kiam ni bonvenigis nin reciproke kaj rememoris pasintaĵojn, ŝi diris:

„Kien vi veturos por ferii?“

„Mi ankoraŭ ne scias, plej volonte mi volus en Slovakion.“

„Veturu en tendaron ĉe Párnica.“

„Kie tio estas?“

„En Oravio apud Dolný Kubín.“

„Kaj ĉu ili akceptos min?“

„Klare.“

„Tial mi veturos.“

„Nu – por ke vi ne estu surprizita, tio estos kune kun buboj. Kaj mi havos tie mian Karlon. Sed ne estas permesite havi komunan ge-tendon. Sekve mankos al mi kunloĝantino. Se tio estus konvena por vi...”

„Bone, ni povus havi tendr kune.“

„Do ni senpere alias, kion vi diras?“

Kaj ni iris aliĝi.

Duondetale mi tralegis la instrukcion, ke ĉiu devas havi sekurigitan lokon en tendo.

La hejmanoj eĉ ne havis tempon por ascii, ke mi veturos en komunan tendaron kun kolegoj.

„Do bonege! Fine oni denove rajtas en Slovakion. Ĉefe bone examenu la tendon. Kaj la ŝuojn,“ diris paĉjo.

„Mi havas tiujn je numero pli grandajn, de la patrino, sed ne gravas, mi jam surhavis ilin, eblas surmeti pli dizajn ŝtrumpojn kaj bone laĉi ilin, tiam ili estos kiel ĝustemezuraj.“

„Kaj por dormado kromajn du kovrilojn, ĉe la Oravo estas malvarme,“ aldonis panjo.

Kiam ni renkontiĝis en stacidomo, mi vidas, ke Věra ankaŭ havas tendon.

„Nu ne gravas, la pli grandan ni starigos.“

Prezentis sin la estro, la medicinstudento Marko, mankis al li eble nur promocio. Unu el aliĝintoj ne venis. Ni ne povis atendi, la trajno estis veturonta.

Dum la tuta vojaĝo ni kantis, torente babilis kaj rigardis la belegan, liberigitan landon.

En Dolný Kubín ni elvagoniĝis – kia aero. Tute ne la praga aero. Ĉi tie estis la slovaka aero. Iom ventetis. El Dolný Kubín ni piediris, sed ĉe la stacio por tendoj kaj ekipaĵoj atendis slovaka ŝarĝaŭto, stiris ĝin junarbaristo Jano. Li ridis al ni kaj ni al li, ni strebis kompreni slovakaajn vortojn kaj li la ĉeĥajn.

Kaj poste konstruado de subtendaĵoj el preparitaj prihakitaj rondlignoj. Ĉe plejparto de la laboro fanfarone rapidis la buboj, tuji li formis stabon kun la studento Marko fruntloke. Ni knabinoj nur enmanigadis al ili segilojn kaj najlojn, niajn konsilojn ili rekompencis per pipraj rimarkoj. Kaj tial ni nur finpreparis la tabulkuŝejojn bonodorantajn per freŝa ligno.

Vespere ni ĉiuj falis sur la kuŝejojn kaj bonan nokton.

Matene nin vokis trumpeto, adiaŭis la lasta noktogardo ĉi-foje el nuraj buboj. Dumvoje mi jubilis kiel aliaj, sed nun mi apenaŭ palpebrume rigardis.

Apud kuirejo staris decimala pesilo, ni ĉiuj pesis nin, la studento Marko notis tion. Mi havis kvardek kvin kilogramojn por 170 centimetroj da alto. Li traboris min per okuloj kaj diris al kuiristinoj, kiuj dume prezentis satigan matenmanĝon:

„Kiu ajn formanĝos ion ajn, lia afero, sed al tiu ĉi vi donu iom pli grandajn porciojn.“

„Nu – mi preferuj ion alian,“ mi dir-singultis.

„Kaj kion do?“

„Se mi eble ne devus havi noktogardon kaj povus dooormi kaj ankaŭ ne devus leviĝi por matena gimnastikado kaj povus dooormi.“

Li ekridis kaj iom pripensis.

„Do bone. Pro sanmotivoj vi povas dormi anstataŭ nokta gardo kaj anstataŭ matena gymnastiko. Mi esperas, ke la ceteraj tion konscios.“

„Memkomprene,“ aŭdigis sin Věra. Kaj tiel mi akiris avantaĝon.

Proksimume en la tempo, kiam ni venis hieraŭ el Dolný Kubín, alŝoviĝis muskolhava bubo, faligis tronistran kaj ĉirkaŭobservis.

„Ha, la hieraŭa malfruiĝinto,“ aŭdigis sin Marko.

„Mi malfruiĝis nur je minuto,“ respektplene rimarkigis la alveninto.

„Ĉefe ke ne je du,“ ekvoĉis iu.

„Tendon vi devos starigi sola,“ daŭrigis Marko.

„Ĉu tendon? Nu, la ordonitan duonon mi havas,“ la bubo klinis sin al la tonistro.

Bruo de rido.

„Kaj kun kiu vi estas interkonsentita?“ aŭdigis sin voĉo el la stabo.

Silento. Sed mi havis ideon.

„Aha, tiu estas vi,“ mi diris.

Li rigardis min surprizite. Sed Věra tion ankaŭ tuj komprenis. Kaj jam ŝi portis el nia tendo mian malgrandan tendon.

„Nu kiel ni renkontiĝis, kiam vi estis aliĝanta, kaj kiel mi promesis al vi tendon. Tutan, eĉ se malgrandan. Jen ĝi,“ mi transprenis de la ridanta Věra mian tendon kaj proponis ĝin al li. „Kaj vi promesis duonon de tendo, ke mi sternos ĝin por mi, ĉu vi jam memoras?“

Ĉiuj rigardis nin, li ekpalpebrumis – kaj akceptis de mia la tendon.

„Dankon,“ li diris.

Se iu krom Věra kaj ŝia Karlo, ankaŭ skolto, komprenis, pri kio temas, tion mi ne scias, sed la studento Marko tion akceptis kaj neglekteme montris post sin, kie la bubo starigu la tendon.

Nur dum la starigo, kun kiu helpis al li Karlo, ni konstatis, ke li nomiĝas Stefano. Li estis iom neordinara bubo. Ne nur pro tio, ke li ne konceptis la instrukcion, laŭ kiu ni devis reciproke interkonsenti pri tendoj. Plie li havis apartan ŝatokupon. Li elprenis dikan matematikan manlibron, en ĝi estis nesolvitaj problemoj kaj li unu post alia solvis. Kaj tiam li ĉiam konvinkiĝis en la malantaŭa parto de la libro, ke li tion faris ĝuste. Kaj li ĝojis, preskaŭ fanfaronis antaŭ ni. Sed iam li polemikis kun la manlibro, li havis alian solvon, kaj al ni li tion klarigis. Sekve – ankaŭ pli poste ni devis defendi lin kaj repuŝi spritaĵojn de buboj. Ĉar plia „matematikisto“ inter ili ne troviĝis. Nu, kun Stefano une ni ne rezignis.

Bonodoris pinoj kaj la ĉirkaŭaj herbejoj... Ĉu vi flaras mielon? Kaj ĝi estis arbara. Jano prizorgadis ĝin el la ĉirkaŭaĵoj al ni por intermanĝoj; li veturis per motorciklo, ke ĝi estas por la ĉeĥaj altlernejanoj, kaj manĝis kun ni.

Ludoj, konkursoj, vesperoj ĉe tendarfajroj. Ni kantis kaj pluan kanton ni proponis altane kun la buboj, tial ni konkursis; kantis bohemian, moravian, slovakian, ankaŭ Jano al la buboj iam helpis...

La tempo kuris kaj Marko sciigis la finan ekskurson, ascendon sur Rozsutec.

Partopreni ni volis ĉiuj, sed Marko elektis. Kompreneble la bubojn ni prenis senelekte, sed nin knabinojn ne. Laŭdire iu devas resti ĉi tie. Knabinoj estis senescepte liaj adorantinoj, eĉ la tuta stabo ne fieris pri tia favoro, jak ili estis junuloj bravaj, sed... Marko ne atentis la inklinojn, nek la propran guston, mallonge ne temis por li pri logĉarmoj, sed pri ŝuoj. La ĉefa afero ĉe elekto de knabinoj estis iliaj piedvestoj. Tio helpis al li ĉe la plimulto, nur ne ĉe mi. Mi montris kun emfazo miajn je numero pli grandajn laĉbotetojn kaj zorge lavitajn dikajn ŝtrumpetojn – vane. Hazarde troviĝis tie Stefano kaj rimarkigis:

„Mi trankvile portus ŝian tornistran. Por mi to estus neniu malhelpo.“

„Ĉu certe?“ Marko ĵetis sur lin esploran rigardon.

„Certe.“

„Nu bone, se vi do volas...“ ekridis al li Marko.

Ni ekiris frumatene. La knabinoj ambiciis, penis, sed antaŭ la suriro sur la monton Rozsutec ili postrestis. Ankaŭ tiuj en ŝuoj. Ili surhavis ilin plejparte, kie akiri dum milito sportbotojn, sole eble feltbotojn, ankaŭ tiujn havis unu knabino, sed ili konvent ankoraŭ malpli, la piedoj ne sidis en ili firme. Kaj tial sukcesis neniu el la knabinoj, escepte de ni du skoltinoj.

Kun la buboj kaj Marko revenis kantante Věra, Karlo, Stefano kaj mi.

Apenaŭ ni vespermanĝis kaj satdormis, Marko tuj matene post gimnastikado atendis min. Mi kompreneble laŭ malnova kutimo ellitiĝis malfrue, sed Marko eldiris:

„Morgaŭ vi leviĝos kiel la ceteraj kaj postmorgaŭ – postmorgaŭ vi havos ankaŭ noktan gardon.“

Mi eĉ ne pepis. Mi ankaŭ dikiĝis je du tri kilogramoj.

Komenciĝis plua mateno. Eksonis trumpeto kaj tial mi lamiris al matena gimnastikado. Iam anstataŭ ĝi okazis pilk-ludado. Ankaŭ ĉi-foje.

Kion diablo volis, Stefano alŝotis al mi. Mi nur velke etendis la krupon kaj poste falis sur la postaĵon. Tuj mi leviĝis, sed nur duone. Duone mi sidis, la montrofigro de la dekora piedo nenature elstaris, kaj kiam Marko tuŝis ĝin, mi sentis pikdoloron.

„Verŝajne ĝi estas frakturo,“ prijuĝis Marko.

„Post momento preterveturos Jano,“ eldiris iu el stabanoj.

Jano ja prizorgadis butikumadon.

„Atendu al li apud la vojo – aŭ – ni forportos vin al la vojo tuj,“ decidis Marko.

Kaj tial ili faris mansidilon kaj du buboj forportis min. Věra min akompanis.

Sekvis infera veturo kun la junarbaristo.

„Ĉu vi timas?“ li demandis min.

„Mi ne timas.“

Li altigis la rapidon.

„Ĉu vi timas?“ li demandis.

Mi obstinis, li utiligis la plej altan rapidon, kiun la motorciklo kapablis.

En la hospitalo de Dolný Kubín ili havis komprenon kaj tuj liveris min al rentgeno, poste la rompitan piedfingron ili rektigis kaj provizis per blanka krmilo. Jano atendis kaj tuj min denove transportis plej rapide en la tendaron. Stefano provis senkulpigi sin, sed mi viciĝis al la buboj kaj kalkulis la ŝoton de apro, kiam ĝi egalas al la kvara dimensio de ektimo. La spritaĵoj nun memkompreneble abundis ne nur por la erara respondo de la ŝoto, sed ankaŭ pro la erara celo...

Tial mi iris heroe al la nokta gardado. La nokta gardado estas belega. Kiu ne spertis ĝin, tiu ne scias, kia estas nokte paco kaj trankvilo, kiel flustras la pinaro... Tion oni ne forgesas...

Domaĝe, ke ni devis adiaŭi Párnica-n. Kaj kiu atendas tion, malsekretiĝis io sekreta. Jano kaj Zebra tiun kromnomon havis Madla en Párnica, adiaŭe kisis sin.

(El ĉeĥa manuskripto verkita por la Bulteno
esperantigis Jiří Patera.)

Zdenka Bergrová

Solstico

La momento, en kiu nia planedo ĉesas malproksimiĝi de la suno kaj komencas denove al ĝi reiri, estas depratempe adorata kiel festo. La solstico. Ĝi memorigas al homoj la konscion pri la donaco de la vivo, tial ili esprimas ĝin per ĝojo pro naskiĝo de infano. La solenadon de la solstico transprenis la kristanismo, ĝi estas fundamento de nia Kristnasko. Ĝi havas la bonodoron de patrineco, de vindotukoj kaj en ili de bebo, la bonodoron de festa humoro, de freŝa pinglobranĉaro kaj de amo. Mi deziras, ke oni povu la Kristnaskon sugesci kiel feston al ĉiuj homoj en la mondo, sed kiel tion fari. Kaj kiel aldoni la vojan senton al tiuj, kiuj ĉi-jare havas nenian Kristnaskon. Mi dezirus supovi veki en ili la certecon, ke foje ankaŭ ilin la kristnaska tempo plenigos per varmo de hejmo.

Dum morna aŭtuno, kiam nia planedo malproksimiĝis de la suno, la tagoj estis ĉiam pli mallongaj, malhelaj kaj plenaj de pluvkota vetero. Kiam la naturo ne pridonacas nin per blankaj flokoj, estas malgaje al ni. Sed la hejmo estas sekurejo... Malofte estas nia alparolo frato kaj fratino tiom plena de la signifo kiel en la antaŭtempa krepusko de lastaj tagoj de la maljuniĝanta jaro...

Maljuniĝi estas destino de la homo. Dum ni ankoraŭ vivas, ni memorantoj malfacile elskuas el animo la rememorojn pri la dua mondmilito, pri la longe pasinta tempo de nia junaĝo. La malheruĝaj afiŝoj de longaj listoj de familioj, ekzekutitaj pro nura aŭskultado de Londono kaj Moskvo, tiom pli pro ribelo kontraŭ la masakrado de nia patrujo. Dum la milito la Kristnasko miksis la amon kaj la doloron. – Kiom pli ĝojaj estis la festotagoj antaŭ la milito...

Dum Kristnasko de mia infanaĝo Prago ne estis superloĝata kaj troplenigita de metalskatoloj de aŭtomobiloj... Silentaj estis la antaŭkristnaskaj firoidoj, la flustranta lumo de ĉarmaj gaslampoj super ili nekuraĝe ĝenis vesperon. Nun ni klopodas remeti la feblajn gaslanternojn en la malnovajn lokojn, kie ili estadis, en Malgrandan Urbon, en Vyšehrad. Sed en la malnova tempo eĉ tio, sur kion la lampoj lumis, ne estis sovaĝe brua...

Nia naskiĝlando estas dum jarcentoj metita al premuj de fortaj potencoj, kaj tiuj ofte ne volas permesi pacon al bonvolaj homoj. La malmolaj manifestiĝoj de la mondo ne troviĝas nur en la ĉirkaŭaĝo, ankaŭ la foraj militoj rememorigas tiun militon, kiun ni travivis. Ili alvenas al ni per amaskomunikiloj kaj vekas nian strebadon pri la paco, pri la reciproka interkompreniĝo de tiuj, kiuj estas en la militon ambaŭflanke puŝataj.

Kaj la reciprokeco mankas ofte ankaŭ inter proksimuloj... Mi komprenas la junajn generaciojn. Ili ne ekkonis la militon ardan, kaj tial ankaŭ la tempon de la malvarma milito ili ne scipovas el sia animo elskui. Ili ne scipovas unuopajn ekzaltiĝojn de najbaroj kompari kun la tempo antaŭa, kiam ne temis pri unuopuloj, kiam temis pri la tuta ĉeĥa nacio. Ili estas per tio ligataj kaj dronas en malatentemo al difektoj nuntempaj. Troviĝas ĉe ni reciprokaj murdoj de entreprenistoj, sinmortigoj de tiuj, kiuj ne estas sufiĉe energiaj por sukcesi en batalo por pano, troviĝas ĉi tie la mizero de senhejmuloj, ofte ili ne kulpas pro ĝi...

Kaj krom tio la necerteco de homoj rangantaj super la ceteraj. Necertecon ne agnoskas riĉiĝintoj, ĉu ili mizerigis por sia ŝajna prospero ceterajn civitanojn kaj suferas pro malbona konscienco, ĉu ii gajnis sen meritoj heredaĵojn, aŭ – kaj estas aparte malfacile ekkonscii – ekzistas ankaŭ necerteco de homoj, kiuj iel diferencas. Eĉ se avantaĝe, eble per talento, diligenteco, beleco, koncize per kio ajn.. La situo de unuopulo en la homa socio ja neniam estas certa – kio en la homa vivo estas certa... Kaj nur la sano kaj reciproka amo valoras elkoran admiron... La malakordoj, kiuj estas inter civitanoj, naskiĝintaj en malsamaj jarindikoj, entute la malakordoj inter malsamaj homoj memorigas la kosmon. En ĝi ja regas glacio kaj ardo... En la majesta, rava kosmo... Kaj ni estas sur ĝia manplato. Ni admiras ĝian neesprimeblan belecon kaj strebas kompreni ĝin. Ĉe tio ni obeas ĝiajn leĝojn, la vivo dependas de ĝi. Versimile ĝi troviĝas ankaŭ en ĝiaj aliaj, foraj lokoj. Ĉu ankaŭ tie ekzistas streĉo inter manifestiĝoj de la vivo? Iam ŝajnas al mi, ke al nia planedo minacas tria mondmilito. Verŝajne ĝi signifus ĉeson de inteligento. Militoj senigas la homon je prebendo pri la indiko homo sapiens.

Kristnasko estas la tempo de reciprokeco. De bonodoro de renovigo de la homa vivo, de patrineco kaj de beboj. Hejmo estas varma ĉirkaŭbrako. Kaj dependas nur de ni – krei ĝin. Ĝi varmigas, eĉ se homojn disigas longa distanco. Ankaŭ tiuj, kiuj foriris en la mondon, havas ĉe ni fratojn kaj fratinojn, ili havas ĉe ni la hejmon. Ni deziras al la tuta mondo de bona volo sanon kaj feliĉon de la hejmo.

Kion devus ĉiuj homoj reciproke donaci al si. Ili devus likvidi atomarmilojn de detruo. La vivon neniigantajn armilojn. Dediĉi al si la pacon. Karaj legantoj, mi kredas, ke en tio ni estas unuanimaj.

(Esperantigis J. Patera)

Karel Havlíček Borovský

Mizere, patrio, mizere

Al honestul' minacas nur malsat',
al ŝtelisto sole pendumilo;
al ĉeĥa literator'
minacas da afliktoj milo:
lin atendas malsat'
kaj ankaŭ pendumilo.

Homo

Se vi havas multon – hi;
sed se nur malmulton – fi;
se vi havas iom – tiom,
kontenta estas vi neniom.

El la historio de ĉeĥa literaturo

De ĉeĥaj libroj mortigaj parazitaj:
Ŝimaĵo, tineoj, jezuitoj.

Demonstratio miraculorum

Ĉu mir', ke du fiŝoj kaj kvin panoj
satigis milojn da popolanoj?
Ĝis nun ankoraŭ tiu ĉi miro
vivtenas la pastrojn laŭ deziro.

Skeptika preĝo

El „Demokrito“ de C. J. Weber

Kara Di'!
Se ekzistas vi?
Gardu animon mian!
Se mi havas ian!?...

(jpa)

Jaroslav Seifert

Printempa tago

Herbe mi kuŝis, ĉie flor',
blovo odora susuris.
Aĥ, Dio, multo pasis for,
iam mi tie gravuris

koron sur blanka arbo-ŝel'
kvazaŭ rozeto burĝonus.
Iri revene? Ebla cel'--
tamen nenion ĝi donus.

Estas jam alta la betul'.
Kio el koro fariĝis?
Iam tenera kor-etul'
nune per krusto kovriĝis.

Kvazaŭ piedo de azen'
hufon sur koto enpremus. –
Kial rigardi kun ĉagren'
kvazaŭ mi scii ne emus? –

Penso trakuris en spirit',
bildon mi vidas konfuze:
Man' mia ludis en hezit'
kun butonetoj surbluze.

Ĉio forpasis longe jam,
vane paroli ĉi plie.

Prenis tranĉilon mia man',
novan gravuras mi tie.

El la poemaro *Adiaŭ Printempo*
tradukis Rudolf Hromada, 1953

Jaroslav Seifert

Printempa tago

En herb' mi kuŝis, ĉie flor',
vento parfumojn eklanĉis,
kiom da jaroj pasis for,
depost ĉi koron mi tranĉis.

Kor' kiel roza burĝonet'
en la blankŝelo betula!
Eblus reveni? Eblus, sed
estus jam vano ĝi nura.

Dum la betulo altas jam,
kio pri l' koro okazis?
Eta, tenka kor' de l'am',
jaroj vin kruste kirasis.

Kvazaŭ – en kot' per hufa puŝ'
spuro ĝi estus azena.
Ho ne rigardu kun kortuŝ',
kiel kompreni malema.

Menson traflugas en subit'
kara bileto olda.
Man' mia ludis kun hezit'
per butonet' ĉedekolta.

Ĉio ĉi foras en pasint',
van' perdi vortojn senpove.

Haste mi per tranĉila pint'
Koron gravuras denove.

El la poemaro *Adiaŭ Printempo*
tradukis Jiří Kořínek, 1957

V bulletinu Obce spisovatelů „Dokořán“ č. 44/2007 básnička paní Věra Ludíková napsala:

„... esperantisté mě požádali o svolení překládat mé básně do esperanta. Je to jazyk, který by měl být podporován v dnešním globalizovaném světě. Má jednoduchou a logickou gramatiku, avšak nesmírně bohatou slovní zásobu, jež je schopna vyjádřit metaforu, základ básní a poetický textů...“

En la bulteno de Civito de verkistoj „Dokořán/Plenaperte“ n-ro 44/2007 la ĉeĥa poetino sinjorino Věra Ludíková skribis:

„... esperantistoj petis min pri permeso traduki miajn poemojn en Esperanton. Ĝi estas lingvo, kiu devus esti subtenata en la nuna globalista mondo. Ĝi havas simplan kaj logikan gramatikon, sed senlime riĉan vortprovizon, kiu estas kapabla esprimi metaforon, la fundamenton de poemoj kaj de poeziaj tekstoj...“

Čestmír Vidman

N i k s o

Raportisto de nia ĵurnalo malkovris en izolita angulo de suda Bohemio proksime de Netolice tian forlasitan kaj abunde sukreskintan fiŝlagon, sur kie bordo sur saliko sidis verda vireto. Li riparis tie difektitajn piedvestojn kaj ne ĝenis sin ekparoli kun nia raportisto. Li plendis, ke la tempo por li estas malfacila. Preskaŭ neniu venas ĉi tien kaj la animoj sub potetojn malmultiĝas. Se aperas ĉe li animo de iu juna virino, post ŝia materiiĝo li proponas al ŝi geedziĝon. Kompreneble tio signifas ankaŭ la homan maljuniĝon kaj postan senrevenan forpason. La naskiĝintaj etaj niksetoj poste malfacile trovas praktik ĉe aliaj fiŝlagoj. Kaj ankaŭ nemultaj junulinoj lasas sin persvadi, kun tiu ĉi malseka vireto pasigi la vivon sub akvo. Nemirinde, en la akvoregno estas nehejmece kaj la propono ne estas alloga. Sed tamen troviĝas junulinoj, kiuj tian ĉi ŝanĝitan vivmanieron volas provi. Elaŭdinte lian deziron povas laŭdire la junulino de tempo al tempo eĉ viziti siajn gepatrojn aŭ proksimajn parencojn. Sed estas problemoj kun tio. La nikso retenas ĉe si la etan nikseton kiel garantiaĵon de la edzina reveno kaj tiun la patrino malofte kapablas forlasi.

- Kaj kiom da edzinoj vi havas, demandas la raportisto.

- Nun mi havas tri, sed mi esperas, ke mi sukcesos gajni ankaŭ la kvaran. Ja eĉ inter la homoj tio estas nenio eksterordinara. La plamo permesas al viroj havi kvar edzinojn. Mi ekaŭdis de homo ĵel la najbara vilaĝo, ke ili nomas min Verdbarbulo, sed tio neniel ĝenas min. Kaj la verdajn barbaĵojn mi ankaŭ elŝiras, ĉar iam ili povas kaptiĝi je iu vepro en la akvo kaj tion mi ne bezonas. Vi demandas, kiel longe averaĝe nikso vivas. Estas malegale. Iu vivas tre longe, eble ekde la tempo de sinjoro Lada aŭ eĉ multe pli longe. Sed eĉ maljuna nikso post iu tempo foriros al siaj niksaj antaŭuloj. Ĉiujn foririntojn anstataŭos la juna generacio. Sed tiuj estas jam malrezistentaj kaj pli pretendemaj. Tutan vesperon ili spektas la televidon kaj malatentas siajn niksajn devojn. Mi ne scias, kiel ĉio tio evoluos, sed senĉese oni parolas inter miaj nejunaj kolegoj pri la fino de niksoj en Bohemio. Vi certe rekonas, ke tio estus granda domaĝo. Sinjoro Erben ja priskribis nin en siaj versoj rimarkinde feroce, sed ni estas pli vere estaĵoj bonkondutaj, tiel kiel ni estas priskribitaj en fabeloj. Kaj se ni malaperus entute, tion la junaj legantoj certe neniam pardonos al ni. Do ĉu vi havas ĉion en ordo surbendigita? Do mi ĝojas. Kaj salutu en via redakto.

(2007-09-14)

Čestmír Vidman

Ĉielo – infero – paradizo.

Ĉiu konas la infanversaĵon, ĉe kiu eblas eĉ saltem sur kampetoj, pentritaj sur la tero. Ĝi estas bela kaj gaja.

La maljunulino Vonásková iam tiun ĉi ludon ankaŭ ludis, sed ĉar maljuniĝante ŝi estas ĉiam pli sciavida, ŝi sendis en la observejon de Petřín informpeton, kiaj estas la dimensioj de la ĉielo, por ke ilit ion precizigu al ŝi, ĉar en Patro Nia ni preĝalvokas Dion – Fariĝu via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero – El la instituto venis respondo: La ĉielo komenciĝas tie, kie estas videblaj la unuaj nubetoj, kaj finiĝas tie, kien ni kapablas ĝisrigardi. – Sed la maljunulino volis ankoraŭ scii, kie troviĝas la ĉiela pordego kaj kiam ĝi estas malfermita.

- Avineto, vi devas turni vin al via paroĥestro. Se vi vivos bonmore, vi certe malkovros ĝin mem.

Similan demandon havis ankaŭ la knabaĉo Ferĉjo. Lia demando ne estis adresata al astronomoj, sed al la direktorejo de minejoj. En kia profundo komenciĝas la infero kaj ĉu ili jam fosatingis ĝin. La minejdirekcio respondis, ke ĝis nun ne, sed ke tie malsupre jam estas sufiĉe varmege. – Sed Ferĉjo ankoraŭ volis scii, ke estas sur la tero la enirejo en la inferon. La respondo estis: - Tio senĉese ŝanĝiĝas. Se vi multe pekos, tiam vi sekure trovos ĝin. -

Restas la paradizo. Anojn Velíšková tre interesus, kie ĝi troviĝas. Ŝi sendis informpeton en la Geografian Akademion. Ankaŭ tie la respondo estis simila. – La paradizo ne havas konstantan lokon kaj ĝia situo senĉese ŝanĝiĝas. Anjo, se vi estos tre kaj tre afabla, vi malkovros ĝin. –

Kaj estas. La tri partoj de nia vivado, lakone kunigitaj en la infana ludo, estas do ankaŭ science eksplikitaj.

(2007-10-03)

(Esperantigis Jiří Patera)

Josef Fousek

K r e d o

Eble pro tio, ke mia avineto Kristýnka el Nemanice kondukadis min en České Budějovice de preĝejoj al temploj kaj ankaŭ ni haltadis e ĉe la plej eta kapeleto inter kampoj kaj ĉe krucifiksoj apud vojo. Mi ne scias. Tie evidente estiĝis mia aparta inklinemo al kredo kiun mi ne scipovis – kaj ankaŭ nun tio daŭras – klarigi. Iaspeca respekto al nekonato, kiu kaŝas sin ie ĉirkaŭ ni. Kaj la rigardon mi fiksas kaj fiksis al la ĉielo, kie mi penas imagi la forton de Di-Sinjoro, kiu estas por mi amiko, al kiu mi kiel al mia edzino konfidencas miajn bonaĵojn kaj malbonaĵojn. Ĉe Li mi serĉas respondojn al mia embarasiĝo. Certe super mia kompreno de la kredo teologo ekmiros, sed tion ne eblas ŝanĝi. Mi ne kredas, ke al iu homo sur tiu ĉi planedo estas klare, „kio estas tie, de kie oni ne revenas“. Malgraŭ tiuj neklaraĵoj mi kredas, ke la kredo estas la plej forta kaj sola forto, kiu kapablas helpi al la homo superi la malfacilaĵojn de niaj vivovojoj. La kredo rememorigas al mi belan muzikon, kiu nin plene enfermas en sian ĉirkaŭbrakon, igas nin forgesi maljustaĵojn, donas al ni forton vivi kaj ami. Estas egale, ĉu temas pri anĝelaroj, gospeloj, bluso, ĵazo aŭ orgenkoncerto de sinjoro Bach. La samon kapablas afabla kaj vera vorto de iu, al kiu ni fias. Ĝi estas la muziko de voĉo kaj de koro. En hospitaloj, kie mi kelkfoje restadis, mi havis multe da tempo por rigardi la blankan plafonon kaj ankaŭ tra fenestro la bluan ĉielon. Ĝi estis por mi blua kaj hela, eĉ se ĝi estis nuboplana. Ĉiam, kiam mi sentis min plej malbone, kiam mi preĝas por mi, por mia familio, por miaj amikoj, ĉiam mi serĉas la nekton de tiu forto, kiun ni nomas Sinjoro. Mi aŭdas la voĉon de sinjoro ĉefepiskopo Karel Otčenášek en la kapelo de la kastelo Český Šternberk. Liaj frazoj pri la universalia amikeco konstante akompanas min. En momentoj, kiam min tuŝas rankoro kaj malamo al kiu ajn, mi ekmemoras la meson en la ŝterneberk-kapelo kaj la afablan vizaĝon de la ĉefepiskopo Otčenášek. Tiam mi diris al mia filo:

„Ĉu entute estas eble, ke hoboĵoj ne konsiderante la koloron de haŭto, la rason, la religion amu sin reciproke?“

Kaj Tomaso respondis: „Eble ne estas grave, ĉu tio estas ebla, sed oni devus ĉiam provi fari tion. Eble iam io estos sukcesa.“

(Tradukis J. Patera)

Miroslav Malovec

Ĉu ni havas strategion?

En la jaro 2007 ni festis 120 jarojn de nia movado. Dum tiu longa tempo la antaŭaj generacioj de esperantisstoj faris multe da laboro. Parto de tiu laboro estis pasema kaj nun estas, for, ekz. kunvenoj, renkontiĝoj, konferencoj kaj kongresoj, pri kiuj restis nur rememoroj. Sed parto havas daŭran karakteron kaj povas servi ankaŭ nun, nome literaturo de ĉiu speco: lernolibroj kaj vortaroj, beletraĵoj kaj fakaj verkoj, turismaj prospektoj kaj broŝuroj, prelegaroj de diversaj kolokvoj kaj seminarioj kaj nelaste multegaj manuskriptoj, kiujn la aŭtoroj ne sukcesis eldoni dum sia vivo, sed la verkoj restis konservitaj en niaj arkivoj.

Ĉefa problemoj por utiligo de tiuj trezoroj estas simpla fakto, ke Esperanto-bibliotekoj ne troviĝas – diference de la naciaj lingvoj – en ĉiuj vilaĝoj kaj urbetoj, ja eĉ ne en ĉiuj urboj kaj urbegoj. Tiuj verkoj estas do malfacile alireblaj eĉ por sperte esperantistoj kaj novuloj tute ne scias pri ili. Ŝancon tre radikale ŝanĝi tiun malfavoran situacion donis al ni en la lastaj dek jaroj la interreto, kiu rapide disvastiĝas tra la tuta mondo. Danke al ĝi povas havi elektronikan bibliotekon en ĉiuj lingvoj inkluzive la esperantlingvan ĉiu privata hejmo, ĉiu familio, ne nur en ĉiu urbo, sed ankaŭ en ĉiu vilaĝeto. Eĉ tiuj personoj, kiuj ne posedas komputilon, povas utiligi la retin servojn en la t. n. interretaj kafejoj, kie oni povas laboru unu horon kutime kontraŭ dudek kronoj. Similan servon proponas ankaŭ publikaj bibliotekoj. Al nespertuloj oni ĉion klarigas, montras kaj helpas.

La interreto – aŭ simple la reto – povas ne nur disponigi al la vasta publiko laboron de la antaŭaj generacioj sed proponas ankaŭ multajn novajn servojn. Ĉiu lingvo ĝenerale havas du ĉefajn taskojn: ebligi komunikadon inter homoj kaj liveri informojn. Per lingvo la homoj ne nur interkompreniĝas kaj diskutas aŭ male kverelas kaj insultas, sed ankaŭ studas, laboras, amuziĝas kaj serĉas informojn pri ĉiuj imageblaj temoj, kiuj ilin interesas. La interreto tiamaniere fariĝas la plej granda tutmonda enciklopedio, sed samtempe ĝi ebligas ankaŭ telefoni, spekti televidon, aŭskulti radion, sekvi okazaĵojn sur la stratoj per specialaj kameraoj, eĉ rigardi la nubojn aŭ la kosmon per kameraoj de satelitoj. Danke al la reto vi povas ĉerpi informojn pri landoj kaj urboj, al kiuj vi volas vojaĝi kaj antaŭtempe Informiĝi pri iliaj memoraĵoj kaj aliaj vidindaĵoj.

Ankaŭ esperantistoj ne dormis kaj jam pli ol dek jarojn laboras por ekspozicii nian movadon antaŭ la publiko. Ni ne havas monon por fondi proprajn televidojn kaj radiostaciojn, ankaŭ librojn ni povas eldoni nur en limigita nombro. Ekz. en 2006 aperis 206 esperantlingvaj libro jen la tuta mondo, dum ĉeĥe aperas 300 novaj titoloj ĉiusemajne. Tiom pli gravas por ni la reto, kie ni povas preskaŭ senpage publikigi ĉion, kion ni kapablos krei. Jam nun ekzistas tie en multaj lingvoj klarigoj, kio estas Esperanto, bibliografio de Zamenhof kaj historio de la movado, troveblaj estas lernolibroj kaj eĉ specialaj retaj kursoj, ne mankas vortaroj, terminaroj,, kelkaj miloj da beletraĵ kaj fakaj tekstoj, muziko kun esperantlingvaj kantoj, sonregistraĵoj de prelegoj de niaj gravuloj, multegaj fotoj pri nia movado, kelkaj mallongaj videoj, kreskas enciklopedio kun jam 91 000 artikoloj, multaj Esperanto-gazetoj proponas apud la papera versio ankaŭ sian retan version, vi povas trarigardi liston de libro jen niaj grandaj bibliotekoj, trovi katalogon de pluraj movadaj libroservoj, dekojn da esperantistaj diskutejoj, turismajn informojn pri multaj landoj kaj urboj, sian prezenton prilaboris preskaŭ ĉiu Esperanto-asocio kaj eĉ multaj kluboj, troveblas historioj de la movado en diversaj lokoj kaj mondopartoj, monografioj de gravaj esperantistoj, lingvaj ludoj por infanoj kaj junularo, informiloj pri la movadaj aferoj, sed ankaŭ pri aferoj tutmondaj, elŝuteblaj estas radioelsendoj – t. n.: podkasej – de Radio Polonia kaj aliaj radiostacioj kaj certe mi ankoraŭ multon forgesis.

Ĉion ĉi faris nur legranda grupo de entuziasmuloj, eble nur unu aŭ du procentoj de la tutmonda esperantistaro. La movado povus fari dekoble pli,, se ni sukcesus engaĝi en la aferon almenaŭ dek aŭ dudek procentoj de esperantistoj.

Kaj estas vere necese fari multe pli, ĉar ankaŭ aliaj lingvoj ne dormas kaj proponas al la publiko ĉiam pli multe da novaj servoj. Tiujn ni bezonas esperantigi, ĉar se Esperanto restos flanke, neniu ĝin bezonos kiel internacian lingvon – por utiligi la proponatajn servojn oni devus lerni aliajn lingvojn, Esperanto ne helpus.

En la mondo nun furoras pluraj edukaj kaj klerigaj projektoj ekster nia movado, kiel Socrates, Gutenberg, Komuna Eŭropa Referenckadro aŭ elektronikaj bibliotekoj. Estas grave, ke ni sekvu tiujn programojn, informu pri ili nian membraron kaj provu krei similajn esperantlingvajn projektor, kiuj povus aliĝi al projektoj alilingvaj. La mondo ne interesiĝos pri ni, se ni ne interesiĝos pri la mondo. **Do la unua ŝtupo de nia strategio estas levi informitecon** de nia esperantistaro pri la lingvaj, edukaj kaj kulturaj projektoj, kiuj furoras en la nuna homaro.

Dua tasko estas prilabori la heredaĵon de la antaŭaj generacioj de esperantistoj. Se ni malrespekte traktos laboron de niaj antaŭuloj, niaj posteuloj simile malrespektos nian laboron. Se la publiko kredos, ke dum la pasintaj 120 jaroj ni sukcesis fari nenion krom kelkaj lernolibroj kaj vortaretoj, ili ne kredos, ke ni sukcesos ion gravan fari en la venontaj 120 jaroj. Plie estas pli facile prilabori komputile jam ekzistantajn verkojn el krei tute novajn, do per prilaboro de nia heredaĵo ni povas iri antaŭen pli rapide. En ĉiu historia sfero estis ankaŭ jam multo farita, sed ankoraŭ multo mankas. Kelkaj kluboj prilaboris sian historion, aliaj ne, pri multaj gravuloj de nia movado ni havas monografiojn, pri aliaj ni apenaŭ restas kaŝita en la arkivoj kaj sekve ne alirebla por la publiko, eĉ multaj materialoj povas perdiĝi, se ili dependas de unuopuloj, kiuj ilin garda sen siaj loĝejoj.

Tria tasko estas prizorgi, ke nia movado kaj asocio estu bone reprezentita antaŭ la publiko. Paperaj kaj retaj informiloj kompletu unu la alian, simile kompletu sin reciproke paperaj kaj elektronikaj lernolibroj, kursoj, konversacioj kaj vortaroj. Denove jam multo ekzistas, sed ne kiel unueca sistemo, multaj malnovaj verkoj povus esti aktualigitaj kaj renovigitaj kaj envicigitaj en informan kaj instruan sistemon.

En la reto kreskas ankaŭ enciklopedio Vikipedio. Estas bezone, ke al ĉi tiu laboro kontribuu multe pli da homoj. La homaro apenaŭ akceptos kiel internacian lingvon ĝuste tiun, en kiu ne ekzistas enciklopedioj (krom pri la Esperanto-movado mem), en kiu oni povus akiri informojn preskaŭ pri nenio. En Vikipedio ĉiu nacio povas prezenti sian nacian kulturon, siajn artistojn, sciencistojn, sportistojn, siajn urbojn kaj iliajn vidindaĵojn kaj tiamaniere helpi disvolvon de turismo. Sed tie ni povas prezenti monografiojn de esperantistaj gravuloj aŭ priskribon de diversaj esperantistaj aferoj, ekz. kio estis Internaciaj Floraj Ludoj aŭ Moraviaj Esperanto-Pioniroj k. s. Printempe ni preparos seminarion en Písek, kiu estos dediĉita ĝuste al laboro por Vikipedio.

Ni devas zorgi ankaŭ pri niaj bibliotekoj. Ni bezonas pristudi, kiamaniere oni ĝuste devas registri paperajn librojn kaj samtempe kontribuci al la virtuala elektronika biblioteko en la reto. Ekzistas jam universitataj kursoj kiel krei elektronikajn bibliotekojn, kaj tiuj kursoj estas troveblaj en la reto. Ni devos ilin pristudi kaj krei ion similan por nia membraro. Monstri, kiamaniere oni skanu kaj enretigu bildojn, kiamaniere tekstojn, kiamaniere muzikajn tekstojn kaj sonregistraĵojn.

Ni bezonas ankaŭ daŭre disvolvi niajn vortarojn, tiu laboro estos neniam finita, ĉar ĉiam aperas novaj inventoj kaj esprimoj ligitaj kun ili. **Ni devas zorgi pri klerikado de la membraro,** renovigi lingvan kaj ekzamenan komisionojn. **Disvolvi la laboron de kluboj kaj sekcioj.**

Povas ŝajni, ke ni volas fari tro multe. Kompreneble, po runu aŭ eĉ dek personoj tio estus tro granda tasko. Sed nia asocio havas ĉirkaŭ okcent membrojn kaj multaj el ili laboras pri la menciitaj taskoj laŭ propra iniciato. Ĉefa problemo estas, ke mankas supervido, pri kio ĉiu el ni laboras, sekve mankas ankaŭ kunlaboro inter la homoj, ili ne kontrolas al si reciproke la jam faritan laboron.

Ni nun klopodas prepari en la reto paĝojn, en kiuj ni provos teni tian supervidon pri aferoj faritaj, farataj, farotaj kaj ankaŭ farindaj kaj farendaj. En kiuj estus ankaŭ matodikoj, kiel labori pri certaj taskoj aŭ prezentitaj komunaj verkoj, al kiuj povus ĉiuj kontribuci. Simple dirite, estas necese ĝustatempe pensi kaj diskuti pri la estonteco de nia movado kaj asocio, ĉar se ni nur rutine daŭrigos la ĝisnunajn kutimaĵojn, la asocio malrapide formortos. La nuntempa junularo ne emas vizitadi klubojn, sed de plej frua infanaĝo kutimas ludi per komputilo kaj vagi tra la interreto. Tial tiom gravas, ke ni faru en la reto paralelan virtualan Esperantujojn, ĉar junaj homoj juĝas, ĉu valoras aŭ ne valoras lerni Esperanton, laŭ tio, kion ili trovas en la reto.

La agoj de esperantistoj donas rezultojn **momentajn** kaj **daŭrajn**. La momentaj estas precipe diversaj renkontiĝoj, kiuj helpas aktivigi kaj amikigi esperantistojn, sed tiaj aranĝoj rapide pasas kaj restigas nur rememorojn ĉe la partoprenantoj. Simile paseme karakteron havas informaj artikoloj en nacilingvaj gazetaraj aŭ leteroj al gravuloj, kio estas ja necesa por konservado de la ekzistanta stato, sed la situacion de la lingvo kaj movado ĝi ne ŝanĝas. Tion povas fari nur agoj, kies rezultoj havas daŭran karakteron, nome kiujn la lingvouzantoj povas utiligi ankaŭ post jardekoj.

En 2008 UEA festos sian centjariĝon. Ĝi povas dokumenti dekmilojn da diversaj esperantistaj aranĝoj, kiuj okazis dum la pasintaj cent jaroj, dekmiloj da personoj aliĝis kaj denove malaliĝis aŭ formortis, tamen la membronombro restas ĉiam proksimume la sama. Por novuloj la pasintaj aranĝoj havas nenian signifon kaj la kvanto de Esperanto-parolantoj ne kreskis. Ĉu do la nuntempa novulo estas en la sama situacio kiel novulo en 1908? Tute ne! La nuntempa Esperanto havas multe pli riĉan literaturon, libran kaj gazetaran, beletran kaj fakan, dokumentan kaj turisman, multe pli riĉan vortostokon leksikografie prilaboritan, detale trakomprenitan gramatikon, multajn fakajn terminarojn, multe pli riĉan oferton de turismaj aranĝoj kaj de reta korespondado kaj en la interreto kreskas virtuala Esperantujo, tage nokte disponebla al miloj da uzantoj kaj milionoj da scivolemuloj.

Ĝuste tiuj scivolemuloj juĝas la forton kaj signifon de Esperanto laŭ tio, kion ili trovas en la reto. La t. n. mileniuloj (gejunuloj naskiĝintaj post 1982, kiuj atingis plenaĝecon en la milenia jaro) jam preferas elektronikajn fontojn antaŭ la fontoj paperaj kaj tiu tendenco verŝajne ankoraŭ kreskos en la futuro. Esperanto-uzantoj apenaŭ multiĝos, se interesatoj ne trovas en la reto sufiĉe da aplikoj. Tial necesas zorge pripensi, kian bildon de Esperanto ni deziras prezenti al la publiko kaj kiujn ĉefajn aferojn la movado devus prioritare prilabori. Per tio mi neniel volas limigi la sponatan iniciaton de entuziasmaj unuopuloj, kiuj enretigas siajn hobiajn, sed estus malbone, se la virtuala Esperantujo konsistus sole el pelmelo de privataj konceptoj, sed mankus unueciga koncepto tutmovada. Plie ne eblas limigi la bildon de Esperanto sole je la virtuala mondo, ĉar la papera literaturo ĉiam posedas sian forton kaj certe ankaŭ en la estonteco ludos gravan rolon.

En ĉiu lingvo aperas multegaj verkoj laŭ personaj gustoj de individuoj, sed ekzistas ankaŭ aferoj, kiujn devas iniciati institucioj sendepende de la intereso en la publiko, ĉar alie la kultura nivelo de la lingvo grave falus. Cetere, la intereso en la publiko ofte vekiĝas, kiam certa ideo estas disvastigata. Ankaŭ sponsoroj kaj fondaĵoj pli volonte subtenas konkretajn projektojn.

En 1995 Eŭropa Komisiono publikigis alvokon, ke oni kreu en la interreto diĝitajn bibliotekojn en ĉiuj lingvoj, por konservi kaj disponigi al la vasta publiko la kulturen heredaĵon de ĉiuj nacioj. La alvoko supozas, ke en la reto aperos milionoj da libroj (kompreneble ne plu blokataj de aŭtoraj rajtoj) kaj ankaŭ bildoj, fotoj, filmoj, sonoj, simple ĉio enkomputiligebla. Precipe tiuj verkoj, kiujn neniu reeldonas, ĉar la eldono estus monperda, havas kancon tiamaniere reveni al siaj legantoj. Eŭropa Komisiono ne diras, kiu plenumu la taskon, sed nur klarigas, kial la projekto estas necesa kaj perspektiva (ĉar ni eniris jarcenton de elektronikaj fontoj) kaj promesas prizorgi la faritan laboron, por ke ĝi ne perdiĝu, se kolapsus komputiloj aŭ ŝanĝiĝus teknologioj.

La laboroj mem dependas de tiuj, kiuj komprenis. Privatuloj komprenis jam antaŭ multaj jaro, ĉar jam nun en la reto oni trovas ĉirkaŭ kvindek mil verkojn en diversaj lingvoj, sed Eŭropa Komisiono celis ŝtatojn kaj instituciojn. Same kiel „paperaj“ bibliotekoj ne ekzistas nur privataj, sed ĉiu ŝtato prizorgas plurajn bibliotekojn oficialajn, prilaboratajn laŭ sciencaj kriterioj, same estus necese fari ankaŭ ĉe la elektronikaj materialoj. Antaŭ nelonge mi eksciis, ke la Masaryk-universitato en Brno enkondukas ĉi-jare kiel novan studobjekton ĝuste la enkomputiligadon de libroj kaj konstruadon de diĝitaj bibliotekoj.

La elektronikaj bibliotekoj estas speciale gravaj por nia movado, ĉar niaj paperaj bibliotekoj ne troviĝas en ĉiu vilaĝo, eĉ ne en ĉiu urbo, sekve novuloj nur legas en sia lernolibro, ke la esperantlingva literaturo ekzistas, sed por ili ĝi estas neantigebla, kvazaŭ ĝi ne ekzistus. En la reto nun troveblas kelkaj miloj da verkoj en Esperanto, sed dissemataj tra la tuta mondo kaj dependaj de unuopuloj, pro kio jam multaj tekstoj perdiĝis. Mankas oficiala pilota projekto de nia movado (kiel la usona Gutenberg, franca Gallica, slovaka Zlatý fond k. s.), al kiu la enkomputiligantoj povus sendi siajn laboraĵojn por konservado sub komuna tegmento kaj kiu povus reprezenti Esperanton inter la diverslingvaj diĝitaj bibliotekoj. Estus katastrofo por nia movado, se en la sistemo de ciferecaj bibliotekoj nia lingvo mankus. Ne gravas, ke multaj homoj tute ne sopiras literaturon – ankaŭ ili juĝas la signifon de lingvo laŭ ĝia literaturo, eĉ se ili ne intencas ĝin legi.

Sed nia movado bezonas fari multajn aliajn gravajn laborojn (por kiuj estas la interreto nur malmultekosta spaco por kolektado kaj publikigado de materialoj).

Ni ĉiuj scias, ke Esperanto estas subevoluinta en la sfero de faka literaturo. Aperis pluraj terminaroj kaj terminaraj vortaroj de kelkaj fakoj, sed kutime nur kun traduko al la gepatra lingvo de la aŭtoro plus la angla. Sed tio ne sufiĉas, ĉar poste en aliaj landoj kvazaŭ la terminaro ne ekzistus... Por studentoj de la angla lingvo estas ellaborataj legolibroj de ilia fako, ekzemple por inĝenieroj, elektroteknikistoj, kemiistoj, kuracistoj, juristoj, agrikulturistoj. Similajn legolibrojn ni bezonas havi en Esperanto...

La homaro bezonas internaciajn lingvojn ne nur por komunikigi la homojn, amatojn kaj fakulojn, sed ankoraŭ pli multe por liveri informojn. Fremdulon oni renkontas nur de tempo al tempo, sed informojn oni serĉas ĉiutage. La interreto estas fakte tutmonda enciklopedio, en kiu oni povas ricevi informojn preskaŭ pri ĉio ajn imagebla. Antaŭ nelonge angla sociologo nomis Vikipedion „Nia virtuala mezerko“ (<http://www.projet-syndicate.org/commentary/fuller5/English>) en pozitiva senco, ĉar ĝi kunlaboris homojn de la tuta planedo, sed la samo validas pri la interreto mem.

Tie aperas enciklopedioj kaj retejoj de enciklopedia karaktero, profesiaj kaj privataj, en diversaj lingvoj, kaj kompletigas unu la alian. Se ni volas, ke Esperanto estu perceptata kiel internacia lingvo, eĉ la internacia lingvo, ĝi devas antaŭ ĉio liveri informojn. Se la retanoj trovas ĉion en la angla kaj aliaj mondlingvoj, sed nur malmulton en Esperanto, nia helplingvo al ili ne helpas kaj ili devas resti ĉe la angla. Ni ne bezonas benon de politikistoj (ili ĝin ja ne donos), ni bezonas ŝtopi interregnon per esperantlingvaj informoj pri ĉiuj temoj, precipe la nemovadaj...

Ni devas zorgi pri la klereco de nia membraro, almenaŭ de ĝia aktiva parto. Ni estas movado lingva, eduka kaj kultura, sekve nia membraro devus esti pli klera pri lingvistiko, pedagogio, tradukarto, literatur-scienco ol tiuj, kiuj studas aliajn fremdajn lingvojn nur por amuzo. Ni volas infuli la mondon, tial ni devas observi, pri kiuj projektoj la mondo okupiĝas, ni devas pri la mondo interesiĝi multe pli intensive ol la mondo interesiĝas pri ni.

Ni havas realan kancon, ke la pozicio de Esperanto inter aliaj lingvoj estos en la jaro 2020 multe pli bona ol nun. Por atingi tiun rezulton, necesas ... labori pri aferoj de daŭra karaktero kaj konstrui per ili la virtualan Esperantujon. Ĝi ja estas konstruata, sed private kaj nesĉeme. La celo bezonas aktivan partoprenon de niaj organizoj kaj institucioj, kiuj tegmentus la laborojn kiel unu grandan sistemon.

Kamila Bártlová – Lampířová

Úvaha filosofická
o protivech protivných

Vědí
člověk
je almara harampádí
nahroucená
u hrotů obhroublých
útroh
Vědí
ta almara harampádí
pádí
rychlým krokem
hrubých hran hranolů
a
tvrdí
ta almara harampádí
s rozumy
v horním patře modré kůry
zavrtanými
že svět je krásný
Vědí
a
tvrdí
až na ty almary
hranaté
až na ty almary
no
jen ty
hranaté

A
vysvětlení
zdůvodnění
proč slov s -er- je tu přemíra
nu
když
někoho něco dožírá
tu
hojnost slov s -er- si vybírá

Medito filozofia
pri naŭ zipoj


Jen
la homo
estas arleken' aŭ zigzagulo
kun naŭ zipoj
Li nin taras
per rimen' aŭ zono

Jen
la arleken' aŭ zigzagulo
ululos
per trombon' aŭ zumas
antaŭ zoo

kaj
asertas
la arleken' aŭ zigzagulo
antaŭzorgema
senkaŭze kaj senpaŭze
antaŭ zomo
ke la mondo belas
Jen

oni
esceptu
almenaŭ zigzagulojn
kun naŭ zipoj
almenaŭ zigzagulojn
ja
nur tiujn
naŭzipajn

Kaj
expliko
argumento
kial multaj vortoj kun -n-aŭz- ĉi konvenas
nu
se
iu ion abomenas
li
abundajn vortojn kun -n-aŭz- alprenas



Esperantigis Jaroslav Krolupper

Pri la vivo de nia klubo en la jaro 2007

La Esperantista Klubo en Praha fine de la jaro ekzistis jam 105 jarojn. La kunvenoj de la klubo okazis regule ĉiusemajne ĵaŭde posttagmeze en kunvenejo en la straro „Ve Smečkáč“, tute proksime al la Venceslaa placo en la centro de la urbo. La kunvenejon senpage disponigas al la klubo la oficejo de la urboparto Prago 1, tial la klubo observas la postulon de oficejo, ke en someraj monatoj julio kaj aŭgusto la kunvenoj ne okazu.

La kunvenejo havas du ĉambrojn, en la unua ni kunvenas, en la alia ni havas du ŝrankojn kun esperantaĵoj; tiu ĉi ĉambro servas ankaŭ kiel te-kuirejo, apude estas necesto.

La kunvenoj de la klubo estas ĉefe konversaciaj kaj instruaj, sed ofte ni havas ankaŭ prelegojn pri Prago, pri interesoj de iuj membroj, kiel pri bestobredado (hundoj, kobajoj) aŭ pri mineral-kolektado. Iam ni eĉ kantas, dum Kristnaska vespero ni kantas kristnaskajn kantojn.

Kelkfoje okazis en la kunvenejo lingvoseminarioj de esperantistaj handikapuloj, kutime antaŭtagmeze en la lasta sabato de monato. Kelkaj klubanoj partoprenis la seminariojn de handikapuloj en Skokovy, ĉu printempe, ĉu aŭtune.

Niaj membroj partoprenis ankaŭ aliajn esperantistajn aranĝojn, kiel la konferencon de ĈEA en Polička, la Internacian Kulturelan Festivalon en Ústí n. L., la Internacian Paroligan Semajnon en Dobřichovice kaj aliajn. S-ro V. Procházka en la klubo informis pri la seminario en Lančov, kiel nuntempe labori por Esperanto.

Du niaj membroj; Ing. Margit Turková kaj D-ro Petr Chrdle partoprenis la 92-an Universalan Kongreson en Jokohamo kaj dum kelkaj klubkunvenoj ili rakontis pri siaj travivaĵoj kaj ankaŭ projekciis lumbildojn pri tio, ekz. pri supreniro de la sankta monto Fuĵi, aŭ pri la renkontiĝo de nia amiko, la 97-jara samideano Kurisu Kei.

Menciinda estas ankaŭ la fakto, ke la 6-an de junio kelkaj klubanoj entreprenis busan ekskurson al la urbo Most, por viziti la mezepokan malfrugotikan preĝejon, kiu estis antaŭ jaroj translokita el la malnova urbo, malkonstruita pro fosado de karbo.

Sed la kultura esperantista vivo flora sen Prago ankaŭ ekster la klubo. Ekzemple la 17-an de marto 2007 kelkaj klubanoj partoprenis la solenaĵon, en kiu niaj amikoj geedzoj Bergr (li pentristo kaj skulptisto, ŝi ĉeĥa verkistino, poetino kaj poem-tradukantino, kies verkoj aperas ankaŭ en nia Bulteno) estis premiitaj de organizaĵo Euro Pragensis Ars. Kaj alia ĉeĥa poetino estas nia amikino: sinjorino Věra Ludíková en siaj publikaj literaturaj vesperoj (en januaro, marto kaj decembro) neniam forgesas Esperanton, ŝiaj poemoj kaj poeziaj tekstoj estas deklamataj ankaŭ en Esperanto fare de s-ano Josef Vích, sed ekzemple decembre legis en Esperanto ankaŭ la ĉeestanta elstara ĉeĥa aktoro Radovan Lukavský. (Estis unuafoje, ke tiu ĉi elstara artisto deklamis en Esperanto).

La Bulteno de nia klubo aperis trifoje, kun verkoj disponigitaj por publiko de Zdenka Bergrová,, Věra Ludíková, Čestmír Vidman, Zuzka Podmelová (la vidvino de Jiří Karen), lastatempe ankaŭ de la kanzon-verkisto kaj radio-programisto Josef Fousek. Sed en la Bulteno estis publikigitaj ankaŭ originalaĵoj de niaj membroj Jaroslav Krolupper, Margit Turková, Jindřich Ondráček, Pavla Zemanová kaj Helena Filová. Ekz. Jar. Krolupper gajnis la unuan premion en la Internacia Literatura Konkurso EKRA-2007, organista en Razgrad, Bulgario, kaj li publikigas poemojn en diversaj eksterlandaj revuoj, ekz. en „Laŭte“. Ni ne forgesu, ke aperis ankaŭ la poemaro de Z. Bergrová „Vesmír zvoní hvězdami – Kosmo sonoras per steloj“ kun paralela traduko fare de J. Krolupper. Ankaŭ Pavla Zemanová publikigas eksterlande kaj partoprenas literaturajn konkursojn.

Eble la sola minuso de la klubo estas, ke ĝi nun ne organizas kursojn. Tial la nombro de klubanoj konstante malaltiĝas. Nuntempe Esperanto disvastiĝas ĉefe pere de interreto, sed estas espereble, ke novaj E-parolantoj malkovros, ke estas utile iam renkontiĝi kun aliaj en klubo por praktike ekzameni sian novakiritan lingvoscion.

En la 1-a nunjara numero de **Střelecká revue** (Pafista revuo) aperis interesa artikolo transprenita el la revuo „Bezpečnostní služba“ (Sekurec-servo) el la jaro 1938. Temis pri artikolo el gazeto de nederlandaj policianoj-esperantistoj „Monata Polica Bulteno“ el la jaro 1937; la artikolon el Esperanto tradukis Fr. Šebesta, membro de la esperantista polica rondeto „Rondelo“ en Prago. En la artikolo kun titolo „Kriminalista mistero – La suno estis murdisto“ estis priskribita afero, kiu efektive okazis antaŭ la unua mondmilito. Viron dormantan sur divano mortigis kuglo, kiu elflugis el kartoĉo kuŝanta sur tablo. La kartoĉo estis varmigita per sunbrilo tiom, ke la pulvo en ĝi eksplodis kaj elĵetis la kuglon, kiu mortigis la apude kuŝantan viron. Posta polica expertizo tion konfirmis.

Generální tajemnice Světového svazu esperantistů UEA paní **Barbara Pietrzak** v úvodníku letošního únorového čísla Revue Esperanto napsala mimo jiné: Ve svém poselství k oslavám Mezinárodního roku jazyků 2008 generální ředitel UNESCO upozornil na nebezpečí, že po dobu několika generací může zaniknout více než polovina ze sedmi tisíc jazyků, kterými se na světě mluví, což je reálná hrozba kulturního ochuzení naší lidské civilizace. Pro nás to je příležitost připomenout, že esperantisté se snaží zachovat všechny mateřské jazyky a v mezinárodních stycích navrhují použití neutrálního jazykového prostředku, který nevylučuje použití národních jazyků – avšak rozhodně se staví proti nucenému používání národních jazyků vytlačujících malé národní jazyky ze světové scény.

Už na začátku 20. Století jeden z největších filozofů Ludwig Wittgenstein řekl: Hranice mého jazyka určují hranice mého světa. Každý jazyk je nositelem národní identity a její kulturní pestrosti, každý je drahokamem v pokladnici světové dědičné jazykové různosti. Každý, kdo mluví esperantem, si to plně uvědomuje.

Toto konstatování paní Pietrzakové vhodně doplňuje výrok korejského esperantisty: Angličtina, francouzština, japonština, čínština a jiné jazyky jsou pro mne cizí jazyky, kterým jsem nucen se učit; ale esperanto pro mne cizí jazyk není, je to můj jazyk, vedle mé mateřštiny je to můj vlastní jazyk.

Aktivity esperantistů na přelomu roku:

24. mezinárodní festival se konal v Düsseldorfu od 27. prosince 2007 do 3. ledna 2008; zúčastnilo se ho 167 převážně mladých esperantistů z 20 zemí. Hlavním tématem festivalu bylo „Cestování“ a účastníci viděli desítky esperantsky mluvených filmů o přírodě Tibetu, Skandinávie, Tanzanie a dalších zemí. V rámci tzv. „Zimní univerzity“ byly předneseny přednášky o čínské astronomii, o životě na Marsu, o historii psychiatrie a další. Úspěšně proběhly taneční a pивní večery, které zpestřovaly esperantské hudební skupiny JoMo a Kajto a zpíval také Michael Bronštejn.

Ve stejné době se konalo novoroční setkání ve Föckinghausen, kterého se zúčastnilo 150 osob, z toho 60 dětí a které mělo podobný program, zaměřený více na zájmy dětských účastníků.

V Iksanu v Koreji se od 28. do 30. prosince 2007 konal seminář padesáti mladých čínských, japonských a korejských esperantistů, kde se diskutovalo na téma *Úloha mládeže pro mírové soužití Číny, Japonska a Koreje*. Seminář byl velmi úspěšný a účastníci se shodli, že v příštích létech by se taková akce měla konat ve větším měřítku, jako jakýsi Asijský mírový kongres.

Od 27. prosince 2007 do 2. ledna 2008 proběhl v Malborku v Polsku Akční týden, kterého se zúčastnilo více než 200 mladých esperantistů z 20 zemí a na jehož programu byl seznamovací večer, silvestrovský ples, filmové a divadelní představení, kvíz, ochutnávka piv a vín, středověká večeře a další. Bylo dohodnuto, že napříště se tento Akční týden bude v Malborku konat každý lichý rok, zatímco v sudých létech se bude konat v sousedních zemích, v roce 2008 na Slovensku.

Praha-ek-2008-01-24

- 24 -

Zadní strana Bultena